Betreff: Unua raporteto de la Universala Kongreso en Bjalistoko, Pollando; Datum: 26.07.2009, 00:45

Saluton karaj ratkapitstoj kaj lernantoj,

mi kore salutas vin de la Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko, Pollando.

Mi nur mallonge volas raporti, kio okazis, kaj esperas, ke vi iomete ĝojas pri tio.

Post 15-hora aŭtoveturado ni dum la pasinta nokto je la 4-a horo atingis Bjalistokon kaj ankoraŭ trovis la tempon mallonge dormi en mia aŭto. Conny de la Detmolda grupo kaj mi ĉiam post ĉirkaŭ du horoj ŝanĝis la ŝoforadon kaj bone atingis la kongresejon. Je la 9-a ni vizitis la akceptejon kaj ricevis niajn dokumentojn. Poste ni veturis al la hotelo kaj feliĉe jam tiam ricevis la menditajn ĉambrojn. Do, ni povis duŝi kaj refreŝiĝi iomete.
Je la 12-a tagmeze komencis la duontaga ekskurso, kiun ni antaŭe mendis. Ni piede iris en la urbocentron de Bjalistoko kaj vizitis multajn vizitindajn vidindaĵojn. Ni vidis, kie iam situis la naskiĝdomo de Ludoviko Zamenhof kaj kie li iris al la lernejo, ktp.
Sed post 6-hora promenado tra la urbo ni poste estis ege lacaj. Feliĉe ni iom paŭzis en la kafejo Esperanto.
Kiam ni daŭrigis la promenadon, venis fulmotondro kaj pluvis, sed feliĉe nur mallonge.

Ni trovis tre multajn amikojn kaj ekkonatiĝis kun multaj novaj konatuloj. Ni multe parolis Esperanton kun ili. Hodiaŭ vespere estis koncerto, sed ni nur mallonge vizitis ĝin, pli ni preferis babili kun homoj en la manĝeja tendo kaj tie trinki bierojn. En internacia rondo kun Andrea, la francino el Liono, kiu estis ĉe la kradrostvespero ĉe Conny, kun italino kaj braziloj, ktp. ni ĝuis tre amuzan vesperon.

En la aldonita foto vi vidas Conny (de la Detmolda grupo), Alke (de la grupo Unterweser, Andrea el Lyon (Francio) kaj min.

Sufiĉas por hodiaŭ, Nun mi estas lacega kaj tuj enlitiĝos. Mi jam ĝojas pri la solena malfermo morgaŭ matene kaj ankaŭ pri la unua kantado kun la internacia koruso. Ankaŭ Josefa-n de nia grupo mi renkontis hodiaŭ vespere.

Ĝis la,
korajn salutojn el Pollando,
Heinz

Betreff: Dua raporteto de la Universala Kongreso en Bjalistoko; Datum: 27.07.2009, 01:00

Saluton karaj Ratkaptistoj kaj lernantoj,

duan fojon mi salutas vin el Pollando. Hodiaŭ matene ni post matenmanĝo en nia hotelo (feliĉe tre proksime al la kongresejo), kie nur loĝas Esperantistoj, ni partoprenis la solenan malfermon de la kongreso. Ĉiuj kunvenis en granda tendego. Kaj la tendego estis plenplena. Estis multaj prelegoj kaj salutvortoj. Ankaŭ la nepo de Ludoviko Zamenhof, Ludoviko Zaleski-Zamenhof, salutis la partoprenantojn, homoj el multaj nacioj salutis la kongresanojn kaj finfine la prezidanto de UEA (Universala Esperanto-Ascocio), Probal Dasgupta el Barato (Hinda Unio) (kiun mi antaŭ kelkaj jaroj renkontis en Göttingen), malfermis la kongreson.

Poste mi partoprenis prelegon de la Internacia Kongresa Universitato pri Teleskopoj. Prelegis prof. Amri Wandel el Israelo. Estis tre interesa. Post tio mi iris al la kurso pri la pola lingvo. Ni iom eksciis pri la pronoco de la polaj literoj kaj provis saluti unu la aliajn, sed la pola lingvo ja estas tiom komplike elprononcebla. Terure!
Finfine mi partoprenis la ekzerco-renkonton kun la internacia koruso. La tenoroj estas, kiel preskaŭ ĉiam, la plej malmultaj, sed Manolo el Hispanio, kiun mi jam renkontis pasintjare en Roterdamo, havas tre belan voĉon kaj kun la aliaj certe bone funkcios. Mi tre ĝojas partopreni kaj prezenti la kantojn venontan vendredon dum la internacia arta vespero.

Hodiaŭ vespere okazis la nacia vespero kaj ni rigardis multajn polajn artistojn, kiuj prezentis al ni muzikojn kaj dancojn de la renesanco kaj folkloro ĝis la moderno. La folkloraj dancoj estis tre belaj, sed la modernaj ne vere plaĉis al ni. Pro tio ni iris al la apuda tendo kaj gustumis biero(j)n en denove tre amuza rondo kun francino kaj meksikino, ktp.

Morgaŭ okazos la kleriga lundo, kaj mi ankoraŭ devas elekti, kiujn programerojn de la amase proponitaj mi volas partopreni.
Estas tre bona etoso ĉi tie kaj Conny kaj mi jam babilis kaj konatiĝis kun tiom multe da homoj, ke ni jam intermiksas la nomojn.

Hodiaŭ kelkfoje pluvis kaj estis iom pli malvarma ol hieraŭ, sed tio ne vere gravas.

Kiel aldonaĵo mi hodiaŭ kunsendas du fotojn de la Solena Malfermo. Ili montras la nepon de la inventinto de la Lingvo Internacia: Ludoviko Zaleski-Zamenhof kaj la amason de la kongresanoj, kiuj partoprenis la Solenan Malfermon.

Ĝis baldaŭ kaj korajn salutojn el Pollando,
Heinz

Betreff: Tria raporteto de la Universala Kongreso en Bjalistoko; Datum: 28.07.2009, 01:31

Karaj Ratkaptistoj kaj lernantoj,
korajn salutojn el Pollando,
trian fojon mi nun skribas al vi kaj kore salutas vin.
Hodiaŭ estis la kleriga lundo kaj en tri blokoj oni povis elekti prelegojn. Kiel unuan prelegon mi elektis rondon, kiu pripensis, kiel organizi kongreson. Sed ne tiom plaĉis al mi, ĉar kelkaj tro diskutis. Kiel duan punkton mi vizitis prelegon pri "distraj matematikoj". Prelegis franco, amiko de Andrea el Lyon. Kaj li tre amuze klarigis matematikajn aferojn. Tiel eĉ matematikon oni povas ĝui. La tria prelego, kiun mi vizitis, estis la plej bela. Temis pri "Ni lernu ludante". Mi ekkonis kelkajn ludojn, kiujn oni povas uzi dum la lingvolernado. Ni vidu, ĉu eble baldaŭ mi prezentos iun el ili.

Bedaŭrinde mi devis forlasi la prelegon jam duonan horon antaŭ la fino por atingi ĝustatempe la teatron en la urbocentro. Post preskaŭ duonhora marŝado mi bedaŭrinde ne tuj trovis la enirejon kaj venis tri minutojn tro malfrue. Kaj mi kaj 5 aliaj homoj ne plu rajtis eniri la teatron, ĉar la seĝoj estis ankaŭ sur la scenejo. Domaĝe. Sed morgaŭ mi provos denove eniri, kvankam mia senkosta bileto nur validas por hodiaŭ. Sed mi provos fari tiel.
Anstataŭ vidi teatran spektaklon mi nun reiris kaj partoprenis la duan ekzercadon de la internacia koruso. Hodiaŭ ni lernis pliajn kantojn por prezenti ilin vendredon.
Post tio mi vizitis koncerton de Ĵomart kaj Nataŝa kun ilia filino Carina. Ili kantas tre bele kaj mi ne povis eviti, ke mi aĉetis kompaktdiskon. Venontan vendredon Carina ankaŭ kunkantos kun la brazila rokbando Supernova.
Post tio mi iom manĝis en la manĝeja tendo kaj babilis multe kun diversaj homoj. Okazis hodiaŭ ankaŭ la balo en la granda tendo kun diversaj muzikgrupoj, sed mi nur parte partoprenis.

La kulmino de la vespero estis la vespera koncerto en la malnova urbocentro: tie ludis la orkestro kaj kantis la ĥoro de la Podlaĥia operejo en Bjalistoko. Amaso da aŭskultantoj vidis tiun prezentaĵon, kaj kongresanoj kaj enloĝantoj. Ili unue prezentis novan komponaĵon kun 9 poemoj de la brita verkisto William Auld (kiun oni iam proponis por la literatura nobel-premio). Kaj poste ili ludis kaj kantis la 9-an simfonion de Beethoven: Odo al la ĝojo . Estis belega etoso, oni ne povas priskribi ĝin. Tiu bela muziko en tiu bellumigita scenejo, kaj apude la lumigita turo de la malnova urbodomo, kaj tiom da aŭskultantoj. La ĥoro kaj la solistoj ĉiuj kantis en Esperanto kaj ĉio estis dirita kaj en la pola kaj en Esperanto. Vere belega kulmino de la tago!!!!!

Nun jam estas post meznokto kaj morgaŭ je la sepa denove mi volas ellitiĝi.

Ĉar estas la tria raporteto, mi sendas al vi tri fotojn hodiaŭ: Carina, Nataŝa kaj Ĵomart, kiuj belege kantis; la ĥoro kaj orkestro de la operejo, kiuj estis la kulmino de la tago;
Kaj post la koncerto mi kaj Josefa el nia grupo renkontis Angela kaj Paulo el Brazilo (en la mezo), kiuj antaŭ tri jaroj ja vizitis nian grupon en Hameln.

Bonan nokton nun al vi, Heinz

Betreff: Kvara raporteto de la Universala Kongreso en Bjalistoko; Datum: 29.07.2009, 00:37

Saluton karaj klubanoj kaj lernantoj,

jen sekvas la kvara raporteto de la UK en Bjalistoko:

hodiaŭ mi havis la tagon de la teatraĵoj: mi eĉ vidis tri da ili.

Matene mi vizitis pupteatraĵon en teatro en la urbocentro. Tre plaĉis al mi. La aktoroj ludis kune kun diversaj, grandaj pupoj kaj muzikistoj sur la scenejo. Poste mi iris al alia teatro, kie mi vidis la teatraĵon "Domo sur la landlimo". Temis pri tio, ke la diplomatoj faris landlimon rekte tra la kuirejo de domo de familio, kiu antaŭe tie tre trankvile vivis, poste tute ne plu.

Post la teatraĵoj mi kune kun kelkaj Esperantistoj iris tagmanĝi en restoracio. La tagmezon mi iom ripozis, skribis kelkajn bildkartojn kaj ĝuis la belan sunan veteron.

Hodiaŭ vespere ankaŭ estis kelkaj diversaj koncertoj kaj prezentaĵoj, sed mi sidis babilante en la tendo kun multaj amikoj. Poste mi rigardis prezentadon de la fajro-teatro.

Morgaŭ mi jam devos pli frue ellitiĝi por partopreni la tuttagan ekzkurson al naturrezervejo.

Korajn salutojn,
Heinz

PS: La kunsenditaj fotoj montras al vi la "plej belan virinon" de la pupteatraĵo, la familio antaŭ ol venis landlimo tra sia kuirejo, la Esperantistojn, kun kiuj mi tagmanĝis: Istvan (ĉe kiu antaŭ 20 jaroj mi jam tranoktis per Pasporta Servo en Budapeŝto), lia edzino el Francio, kanadano, ukrainino kaj usonano. Ili staras antaŭ unu mapo, kiu montras la Esperanto-vojon en la urbo. Kaj la lasta montras al vi la fajro-teatraĵon.

Betreff: Kvina raporteto pri la Universala Kongreso en Bjalistoko; Datum: 30.07.2009, 01:32

Saluton karaj klubanoj kaj lernantoj,

hodiaŭ estis la ekskursa tago. Okazis 6 diversaj ekskursoj kun buso al proksimaj vidindaĵoj. Oni jam antaŭe devis mendi bileton. Mi elektis la ekskurson al la Narew-rezervejo. Unue ni tamen vizitis (denove por mi kaj multaj aliaj, ĉar ni jam ĝin vidis dum la duontaga ekskurso) la palacon de Branicki. Post tio ni veturis al somerpalaco de

Branicki, sufiĉe malgranda ĝi estas, sed havas grandan ĝardenon. Oni nun volas rekonstrui la ĝardenon. Poste ni vizitis la naturrezervejon Narew, kiu estas marĉa tereno, kie dividiĝas la rivero Narew en multaj malgrandaj riveretoj, nomata ankaŭ la "Pola Amazonio". Sur lignaj vojoj ni iom povis iri tra la tereno. Estis tre bele, iri tra tiu naturo. Post tio ni pluveturis al la urbo Tykocin, kie ni unue tagmanĝis. Estis interese, ke mi sidis ĉe la tablo kun homoj, de kiuj ĉiu venis el alia lando: kun iranino, vjetnamino, israelino, italo, koreo, danino kaj svedo. Ni ege estis malsata, ĉar nur post la 14-a ni tagmanĝis, sed bongustis. Poste ni vizitis proksime la 2-an plej maljunan sinagogon en Pollando kaj memortabulon por la patro de Ludoviko Zamenhof: Marko Zamenhof, kiu naskiĝis en tiu urbeto. Je la fino de la vojaĝo ni ankoraŭ vizitis Pentowo,

la unuan Europan Vilaĝon de Blankaj Cikonioj. Ni eĉ vidis ege multe da cikonioj kaj estis ege interese observi ilin.

Hodiaŭ vespere mi havis tre interesajn renkontojn: Unue mi iomete ekzercis ĵongli kun japano, kiu kunportis siajn ĵongladpilkojn, poste mi havis interesan babiladon kun litovo. Kaj post vespermanĝo en picejo Andrea kaj mi iris al trinkejo, kie min subite alparolis juna viro el Brazilo. Li tuj ekkonis min, sed mi tute ne sciis lian nomon kaj ankaŭ ne rekonis lian vizaĝon. Finfine li diris tion al mi kaj nur tiam mi sciis, ke mi antaŭ unu/du jaroj longe babilis kun li per Skajpo. Sed tiam li havis ege longajn harojn kaj nun tre mallongajn. Kaj mi imagis, ke li estas pli alta, sed estas same alta kiel mi. Ni iom babilis kaj ĝojis ĉi tie vidi unu la alian nun fizike. Leandro nun ludas gitaron en la rokbando Supernova, kiu morgaŭ koncertos. Kaj mallonge antaŭ ol ni volis foriri ni renkontis JoMo, la faman muzikiston el Suda Francio. Ni hejme havas kelkajn kompaktdiskojn de li. Li sidiĝis eĉ ĉe nia tablo kaj ni longe parolis kun li. Li estas tre interesa, lerta kaj sagaca homo. Ankaŭ li morgaŭ koncertos. Andrea ricevis eĉ autografon de li. Dum la forirado ni renkontis aliajn muzikistojn, la anojn de la grupo Asorti (kiujn mi jam invitis al Hess. Oldendorf por koncerti, sed poste tamen ne eblis). Ili diris al ni, ke ni ne forgesu, ke ni morgaŭ venu al ilia koncerto. Do, morgaŭ estos la tago de la koncerto: Asorti, JoMo, Supernova. Plenplena la programo!

Do, ĝis la, fartu bone,
Heinz

PS: La kunsenditaj fotoj montras: la Narew-regionon, la malnovan sinagogon, nesto kun juna cikonio kaj Daniel (el Frankfurt), Andrea (el Lyon), JoMo kaj min.

Betreff: Sesa raporteto de la Universala Kongreso en Bjalistoko; Datum: 31.07.2009, 02:27

Saluton karaj,

hodiaŭ estas mia koncerta tago. Sed matene mi partoprenis prelegon pri la kongresa temo: Krei pacan ponton inter la popoloj: Zamenhof hodiaŭ . Estis interese. Poste mi partoprenis kunsidon de la Kristanaj Ligoj por Esperantistoj.

Tagmeze (estis varmega tago hodiaŭ) ni iris en la urbocentron al la Kafejo Fama, kie okazis teatrajo: Ludoviko - Lazaro - monodrama spektaklo. Georgo Handzlik bonege ludis la rolon de Zamenhofo kaj parolis pri lia vivo. Ege amuze! Kaj ankaŭ li partoprenigis la publikon, iu devis mueligi kafon, alia ricevis brandon por trinki. Bonege, kiel bone George ravis la spektantojn!

Posttagmeze, post ekzercado kun la internacia koruso, ni vizitis koncerton de Asorti. Estis bonege, kiel bone kaj rapide Edgar ludis la violonon. Vespere sekvis la dua koncerto de JoMo en parko de la urbo. Multaj homoj aŭskultis lin kaj mi dancis la tutan tempon (ne nur por forpeli la kulojn!). Estis ege bela etoso. Bedaŭrinde la koncerto okazis samtempe kun la koncerto de Supernova, kaj kiam ni alvenis al la trinkejo, kie Supernova ludis, ili ĵus finis la koncerton. Sed tamen mi kaptis la okazon aĉeti kompaktdiskon. Conny kaj mi poste ankoraŭ iris denove al la kafejo FAMA, kie okazis vespero kun diversaj artistoj. Ni trinkis bieron kaj ĝuis la bonan etoson, kiu ankaŭ tie estis.

Ĝis morgaŭ,
Heinz

Kelkajn fotojn mi ankaŭ aldonas hodiaŭ, se vi permesas:
Mario kreis novan T-ĉemizon, vi legu mem ....
Georgo Handzlik
JoMo kantante ludas gitaron
kaj la publiko ege amuziĝis

Betreff: Sepa raporteto pri la Universala Kongreso en Bjalistoko; Datum: 02.08.2009, 23:31

Saluton karaj klubanoj kaj lernantoj,
post nur 13-hora aŭtoveturado Conny kaj mi alvenis hejme je 3-a 30 hodiaŭ nokte.

Bedaŭrinde vendredon mi ne plu trovis la tempon por skribi. Vendredon ni komencis per tre vidinda filmprezentado pri pilgrimado sur la pilgropado al Santiago de Compostela. Bruno Robineau, kiu antaŭe jam dum 8 jaroj vojaĝis tra la mondo, montris en belegaj fotoj la pilgrimadon kun sia edzino, kaj parte ankaŭ kun siaj gefiloj, sur la vojo al Santiago de Compostela.
Post tio mi ekzercis kun la internacia koruso, kaj ankaŭ tuj post la tagmanĝo denove.
Posttagmeze mi iom devis ripozi en mia hotelĉambro kaj ankoraŭ skribi kelkajn poŝtkartojn.

Vespere okazis la internacia arta vespero. La internacia koruso komencis la prezentadon per la kantado de tri kantoj. Ni bone sukcesis kaj ricevis aplaŭdon. Post ni prezentis sin la soprana kantistino Joanna Albrzykowska Clifford. Ŝi perfekte prezentis recitalon "Eŭropa diverskultureco kaj multlingveco", kantante 10 kantojn en dek naciaj lingvoj de 10 diversnaciaj komponistoj, aldone kanton en Esperanto. Post ŝi venis la Amatora Belorusa Kanta Ensemblo Malanka, kiu kantis bonege folklorajn kantojn, kiuj ne plu lasis la homojn sidante. Post ĝi venis JoMo kaj ludis parton de sia koncerto, kun la helpo de Tone. Multe da homoj dancis kaj faris polonezon tra la tuta tendo. Estis ege bona etoso. Ni finis la vesperon trinkante lastan bieron en la trinkejo de la kongresejo.

Sabaton ni kunvenis lastan fojon en la kongresa tendego por ĉeesti la solenan fermon. Okazis multaj paroladoj kaj oni honoris kelkajn homojn. La flago estis transdonita de la vicurbestro de Bjalistoko al la ĉeforganisanto de la venonta UK en Havano, Kubo.
Kaj ni eksciis, ke la estraro de UEA decidis, ke la UK en 2011 okazos en Kopenhago, Danio.

Post la solena fermo ni adiaŭis de multaj amikoj kaj lastfoje vizitis la libroservon, kie ni aĉetis kontraŭ nia lastaj zlotoj ankoraŭ librojn aŭ diskojn. Je la 3-a 30 ankaŭ ni adiaŭis Bjalistokon kaj komencis nian hejmenveturadon.

Sur la fotoj vi vidas :
min kantante en la internacia koruso,
Joanna Albrzykowska Clifford akompanante de pianistino kune kun Joanna Filipowicz-Choroszucha kaj Georgo Handzlik (kiel Ludoviko Zamenhof), kiu prezentis la programerojn,
la ensemblo Malanka dancigis la homojn,
mi, Andrea kaj Conny kun la simbolo de tre konata regiona bierfabriko,
la UEA-prezidento Probal Dasgupta fermas la kongreson.
Korajn salutojn, Heinz